



Je via servo tra ok
jaroj, de post 2013

2020: rekorda jaro:
kun 60 komunikoj

Subtene al la loka,
landa, faka kaj
regiona agado

EKO 2021-49 sendita el Budapeŝto la 13an de novembro

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

AMO 78 ekis: arigis amason da kulturuloj

Tiu dutaga seminario ekis hodiaŭ, kun riĉega kolekto da kontribuantoj el la kultura sfero. Kiel kutime, la seminarion malfermis la patro de la AMO-programo, Stefan MacGill, kies parolnotoj aperas sube, pri la grava rolo de tradukado por la travivo kaj pluvivigo de la lingvo. Ĝi konservas sian notan formon de unuopaj punktoj.

Zamenhof estis dekomence grandkvanta plenumanto de tradukado.

Li komprenis, ke ne sufiĉas doni la gramatikon kaj vortlistojn.

Li devis montri la lingvon vivokapabla kaj montri ĝian praktikan uzon.

Tradukoj donis al la pioniraj esperantistoj manieroj kompreni la novan lingvon kaj kompari ĝin kun io konata.

La defioj de tradukado plie montris al li, la malfortajn kaj kuracendajn punktojn en la evoluanta lingvo. Do, la unuaj tradukoj ne havis ĉefe literaturan celon, sed varban, diskonigan kaj edukan.

Kabe kaj ĉiam pli da pioniroj suplementis la korpuson de bonaj tradukoj.

En la epoko de la Budapeŝta skolo, Baghy, Kalocsay kaj aliaj transigis la emfazojn al literaturaj celoj. Tion spronis la postaj skotaj kaj iberiaj skoloj.

Kroatio avangardis en la uzo de tradukoj por interŝanĝi kulturajn valorojn inter malpli disvastigitaj kulturoj – naturaj aliancoj por Esperanto.

En la nuna AMO-seminario oni kolektiĝis honore al la kroata tradukistino Lucija Borčić. La seminario estos bona ebleco ekscii pli pri ŝiaj kontribuoj al la verka kaj traduka arto, sed same pri aliaj foje kaŝitaj perloj kaj pristudi perspektivojn por la estontaj direktoj por la tradukaj artoj.

https://www.esperanto.hr/lucija_borcic_omagxe.htm

Plio el la seminaria enhavo sekvos en estontaj EKO-komunikoj

Alkroĉita la plejlasta programo por AMO 78!

Lingvistoj daŭre subtenataj de UEA en Nov-Jorko

La novaj eldonoj de Ipl (Informilo por Interlingvistoj, 117) kaj Ifl (ĝia anglalingva eldono: *Information for Interlinguists*, 17) haveblas rete:

Ipl (Esperante):

Trovu la novan numeron kaj pli fruajn numerojn

ĉe: <http://www.esperantic.org/eo/publikaioj/ipl/>

Ifl (angle):

<http://www.esperantic.org/en/publications/ifi-information-for-interlinguists/>

Informilo por Interlingvistoj estas publikaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ipl kaj ĝia anglalingva eldono (Ifl) disponigas informojn kaj ĝisdatigojn en la kampoj de planlingvoj, interlingvistiko kaj lingvoplanado. La ambaŭ eldonoj enhavas detalojn pri eventoj, novaj publikaĵoj, raportojn pri lastatempaj konferencoj, kaj disponigas multajn aliajn informojn por universitatoj kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas pri interlingvistiko kaj rilataj kampoj. La limdatoj por kontribui al Ipl kaj Ifl estas la: 3a de marto, 30a de junio, 30a de septembro kaj la 31a de decembro.

Zamenhoftagaj afiŝo okupfrapaj

Faru elekton laŭ via prefero, elŝutu, ekuzu!



Demokrata Kongolanda Eesperanto-Asocio

Okazis la ceremonio de la transdono kaj repreno inter la eniranta komitato kaj la eliranta komitato de DKEA. Sed ankaŭ la okazigo de la unua kunveno de DKEA.

La membroj de la Estraro kiuj partoprenis la eventon estis:

- S-ro Jean Bosco MALANDA, Prezidanto
- S-ro Alphonse WASEKA, unua Vicprezidanto (rete)
- S-ro Guy-Roger ILEKA, dua Vicprezidanto
- S-ino Alexandrine OMBA, Sekretariino
- S-ro Honoré MAFUILA, Kultura konsilanto

Forestis pro funebra situacio:

- S-ro Arlain DIKIZEYIKO, Administra kaj financa konsilanto
- S-ino Monique BADIENGISA, Kasistino.

Ekster la Komitato partoprenis la eventon:

- S-ro Jean-Pierre LUNGKISA, eksprezidanto de DKEA
- S-ino Martine SHAKO, Vicprezidantino de Virina grupo
- S-ino Brigitte MUPANZI, Sekretariino de Virina grupo
- S-ino Christvit NGONGO, junulara grupo

Pluraj punktoj estis traktitaj por revivigi la Landan Asocion. La nacia movado denove ekflugas por skribi novan paĝon en sia historio.

Jean Bosco MALANDA LUTETE, Prezidanto de DKEA

Konkurso Ĝanfranko invitas viajn konkursaĵojn

Itala Esperanto-Federacio, por omaĝi Gianfranco Molle, la plej faman italan kantiston, tutmonde konatan, animon de "Muzika Kulturo", decidis organizi konkurson pri kanzonoj originale verkita en Esperanto. La komisiono povos asigni ĝis tri premiojn. La rezultoj estos anoncigitaj en kadre de la itala kongreso de Esperanto, dum specifa programero. Ĉiu persono rajtas konkursi per maksimume tri verkoj, kiuj devas esti neniam antaŭe eldonitaj per ajna komunikilo (prese, rete, lege, bloge, ktp). Maksimuma daŭro de kanzono estas 5 minutoj. La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso dum la sekvaj tri jaroj. La konkursaĵojn oni sendu al la sekretario, Norberto Saletti, al la adreso concorso@esperanto.it indikante la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivan nomon kaj adreson; ili estu kantitaj kaj luditaj en aŭda formato mp3 aŭ ogg, kaj skribitaj (nur vortoj, eventuale kun akordoj) en teksta formato doc aŭ odt.

Premioj: la gajninto de la unua premio, premio Ĝanfranko, ricevos monpremion de 250,00 eŭroj; por la aliaj la premio konsistos el esperantlingvaj KD-oj. Limdato por la sendado estas la 30-a de majo de la konkerna jaro. Juĝkomisiono: prezidanto: Michela Lipari, sekretario Norberto Saletti, juĝantoj: Giulio Cappa, Valerio Dalla, Marcella Fasani. La sekretario informos ĝis la 1-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio. La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je unua publikigo. Por informoj : <concorso@esperanto.it>, FEI, concorso, via Villorosi 38, IT-20143 Milano, Italio

Libroj por monda deziro – akceptita en Afriko

Itala Esperanto-Federacio decidis donaci iom da libroj kiuj estas en ĝia stokejo al bezonhavas grupoj. Tiucele alvokis la italajn esperantistojn donaci monon por la sendokostoj. La italaj esperantistoj respondis pozitive kaj entuziasme, Jen la foto de la ceremonio en Kongo por festi la alvenon de la libroj en Baraka. Byelongo Elisee



Ambaŭ komunikoj (nuna kaj sekva) de Michela Lipari.

Valora elektronika libro en Brazilo – UEA peras ĝin

Marco Lucchesi estas plurjara prezidanto de Brazila Beletristika Akademio En 2021 li elektiĝis kiel nova membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. La libron “Alivorte” li decidis aperigi absolute senpage kaj elektronike - kaj donacis ĝin al UEA por distribuo al la komunumo. La libro ankaŭ omaĝas al la 700 jaroj de la morto de Dante, memorata en 2021. Lucchesi mem estas kuratoro de ekspozicio pri la temo ĉe la Nacia Parlamento de Brazilo. Legu pli ĉe uea.org/gk/994. La libro estas frukto de kunlaboro de la aŭtoro kun UEA, Brazila Esperanto-Ligo kaj la lokaj asocioj de San-Paŭlo (EASP) kaj Rio-de-Janeiro (AERJ).

Fernando Maia Jr.

===== vortoj: 950 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj eĵuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la **17a aŭgusto 2021** (per EKO 2021-34). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de post 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.

**Servo subtenata de
Universala
Esperanto-Asocio
kaj Internacia Ligo
de Esperantistaj
Instruistoj**



Helpantoj:
Rob Moerbeek
Gbeglo Koffi
François
Lo Jacomo

ENHAVO

- AMO 78 ekis
- Zamenhofatagaj afiŝoj
- Kongo DR – nova estraro
- Informoj el Italio
- Inda libro de UEA